



FERVOJA ESPERANTISTO

ORGANO DE INTERNACIA ASOCIO DE LA ESPERANTISTAJ FERVOJISTOJ

Prezo de unu numero en Ĉeĥoslovakio 1 Kč
Abonpago por 10 numerojn en Ĉeĥoslovakio 10 Kč
por ceteraj landoj 20 Kč
aŭ nacia mono laŭ la tabelo inter anoncoj.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
EN PRAHA II, TĚŠNOV Nº 10 (Ĉeĥoslovakio).
Responda redaktoro, fervoja ĉefrevidento Jaromír Ivanovič.
Posedanto kaj eldonanto Oldřich Adámek.
Presejo »Politika« en Praha.

APERAS MONATE.
La manuskriptojn oni ne resendadas.
Pri la prezoj de komercaj anoncoj sin turni al
la administracio. — Poŝteĉko ĉeĥosl. Nº 21.265.

Por la vojo....!

Sep jaroj estas pasintaj de tiu momento, kiam la laboro de I. A. E. F. devis esti ĉesigita pro la eksplodo de la mondmilito, de kiam la ekfloranta asocio mem estis disbatata.

La mondmilito, detruinta multajn valorojn, tamen ne sukcesis, ne sole detruĵi la ĉiam pli kreskantan Esperanto movadon, sed eĉ haltigi ĝin. Kontraŭe — la mondmilito pruvis, ke universala interkomprenilo estas urga postulo de nia tempo. Antaŭ ĉio estis la malgrandaj nacioj fariĝintaj memstaraj sekve de la milito, kiuj pripensis la demandon pri helplingvo kaj energie ĝin akceladis. Ankaŭ la Ligo de Nacioj interesiĝas je enkonduko de internacia helplingvo.

Do ne povis ŝkaŝi, ke tiuj rondoj, kiuj jam antaŭ la milito estis ekkonintaj la gravecon de la helplingvo kaj estis pruvintaj ĝian realigon, ne komencu denove labori. Ankaŭ inter la fervojistaro fariĝis vivanta la ideo, revivigi niajn interrilatojn al la XXIIA U. K. de Esperanto en Praha estis rezervita la tasko, efektiviĝi la intenco. La 2an de aŭgusto 1921 en lernejo (Pštrosova 13 la I. A. E. F. reviviĝis. La ĉeestantaro unuanime decidis, finkonstrui la verkon komencitan de nia ŝatata kolego Berlande antaŭ 12 jaroj.

Estu permesite al mi ĉi tie danki al la spirita iniciatoro kaj al la efektiva fondinto de nia asocio, s-ro Armand Berlande kaj al la senlaca redaktoro de nia faka organo, s-ro Bontemps. Estis en la jaro 1909a, kiam kolego Berlande alvokis ĉiulandajn fervojistojn esperantistajn, invitante ilin kunveni en Barcelona dum la Va U. K. de E., por fondi Internacian Asocion de Esperantistaj Fervojistoj. Al ili apartenas kaj direktiĝu nia danko... Ilia verko disfalis, sed vivas ilia spirito.

En ilia senco ni volas plue konstrui la verkon, meti brikon sur brikon, ĝis kiam estos finkonstruita la domo, kiu sub sia tegmento ĉiujn fervojajn esperantistojn unuigos. Ni povas esperi, ke ĉi tiu tempo ne plu estas malproksima. Sincere kaj pacience ni plenumos niajn libervole promesitajn deĵojn. Fervojistoj Esperantistaj! Montru vian potencan antaŭ la esperantista mondo ankaŭ rilate la lingvon Esperanto. Ĉiu faru sian devon; ni montru, kiajn fortojn ni povas disvolvi, kiam ni sole volas.

Nia faka organo estu la ilo, kiu nin interligas. Zorgu ĉiu, ke ĝi fariĝu tia, kia ĝin vidi ĉiu deziras. Ĝi estu la fonto, el kiu ni ĉerpas. Ni esperu, ke estonte nenio malhelpos nian laboron, por ke nia sonĝo baldaŭ efektiviĝu. Ni ĉiuj diligente laboru!

Obstine antaŭen ĝis la venko!

Georg Habellok,
prezidanto de I. A. E. F.

Fervojo kaj esperanto.

La plej gravajn internaciajn interrilatojn pri zorgas ĉiutage fervojoj, kiel iloj perantaj internacian komercon. Por ebligi kaj plifaciligi ĉi tiujn interrilatojn, kontraktis ŝtatoj respektive fervojaj administracioj diversajn konvenciojn, el kiuj en Eŭropo plej konata estas la interŝtata Berna konvencio pri fervoja transporto de komercaĵoj. Jam okaze de kontrakto de ĉi tiu konvencio oni devis solvi eĉ lingvajn demandojn. Origina teksto de la konvencio estis redaktita en la lingvo de diplomatoj, kiun bone scipovis okcidenteŭropaj administracioj aliĝintaj al la konvencio, sed por la mezeŭropaj anoj oni devis aldoni germanan tradukon kaj decidi, ke la germana teksto estas same valora kiel la origina franca teksto koncerne la transporton, kiun partoprenis iu fervoja administracio, kies administra lingvo estas ekskluzive germana aŭ paralela kun ĝi iu alia nacia lingvo.

Tiamaniere oni povis plifaciligi komercajn interrilatojn en epoko, kiam en Mezeŭropo ekzistis: „Verein der deutschen Eisenbahnverwaltungen“ (Unuiĝo de germanaj fervojaj administracioj), sed jam tiu decido pruvis, ke la franca lingvo — tre taŭga por diplomatoj — ne taŭgas por plifaciligi internaciajn komercajn interrilatojn eĉ sole en Eŭropo. Kaj la fervojistoj servintaj en limstacioj de meza aŭ orienta Eŭropo certe povas multe rakonti, kiamaniere tiaj internaciaj sendaĵoj malfaciligis la servon al la personaro en lingvaj rilatoj. Sed pli malagrablajn spertojn faris la oficioj en centraj administrejoj, se okaze de reklamacioj ili trovis en aktoj pritraktojn skribitajn en fremdaj lingvoj, kiujn ili ne komprenis.

Tiuj malfacilaĵoj pligrandigis post la milito, kiam en meza Eŭropo estis fonditaj novaj ŝtatoj. Ni pripensu nur: se antaŭ la milito iu komercaĵo estis transportita el Rjeka (Fiume) trans Ljubljana (Ljubach) — Wien — Brno (Brinn) — Breslau — Poznań (Posen) — Königsbergon kaj se kaŭze de reklamacio oni devis poste esplori en rilataj stacioj sekvante la vojon faritan de la komercaĵo, do tiam la esploraj priskriboj en la tuta akto estis skribitaj sole germane. Nune tiuj esploroj estus priskribitaj itale, serbe, germane, ĉeĥe, pole kaj ree germane. Kiom da tempo kaj kiom da mono kostas ĉiun fervojan administracion la tradukado de la esplorpriskriboj? Kaj kiom da malkompreniĝoj kaŭzas tiaj tradukoj?

Ĉiu fervoja administracio sentas malekonomiecon de la nuna praktiko, sed neniu el ili kuraĝas fari proponon je plibonigo t. e. je elekto de iu lingvo kiel reciproka interkomprenilo.

El naciaj lingvoj eŭropaj pleje taŭgas por ĉi tiu celo la belsona lingvo itala, ĉar ĝi estas el la naciaj lingvoj plej facile elernebla kaj paroligebla. Sed pri realigo de tia propono oni ne povas eĉ nur pensi, ĉar tiurilate kontraŭstaras angloj, kies lingvo estas nune preskaŭ tutmonda interkomprenilo ĉe transmaraj komercaj interrilatoj. Sed fanda scio de angla lingvo estas nur malfacile akirebla kaj la kapablo de ĝia ĝusta elparolado estas por multaj nacioj entute ne-

atingebla. La germana lingvo estas nune haltigita en sia disvastigado, pri la franca lingvo ni jam parolis supre. Nun ni tute malatentu la rivalecon inter naciaj lingvoj kaj pripensu nur ĉu el praktika vidpunkto estus penseble elekti unu el naciaj lingvoj kiel internacian interkomprenilon ĉe la fervojoj.

Por plifaciligi kaj malmultekostigi fervojajn interrilatojn, estus necese, ke ĉiu fervojisto estu kapabla interkompreniĝi per la elektita interkomprenilo t. e. ke li komprenu ĉiujn notaĵojn en veturiga letero, en veturiga karto, en ŝarĝlisto, en tabeloj pri transdonataj komercaĵoj, en doganaj paperoj k. t. p., kaj ke li aŭkaŭ estu kapabla bone esprimi siajn pensojn per tiu elektita interkomprenilo tiamaniere, ke okaze de ofica esploro la tuta akto estu skribata sole en unu t. e. en la elektita lingvo, por esti sen tradukoj komprenebla al ĉiu fremdlanda fervojisto. Tio ĉi komprenebla al ĉiu fremdlanda fervojisto. Ĉu estas penseble, ke ĉiu — eĉ plej malinteligenta — fervojisto povus akiri tian profundan scipovon de iu fremda nacia lingvo? Certe ne!

Do post kelka tempo fervojaj administracioj estos devigitaj elekti iun facile elerneblan kaj paroligeblan ŝarĝlistan lingvon. Konsiderante la nunan disvastigon de nia lingvo ni povas esperi, ke esperanto estos elektita kiel tiu interkomprenilo.

Kaj do, karaj samideanoj, grava demando: Ĉu ni jam estas tiel preparitaj se tia elekto de la fervojaj administracioj efektiviĝos, ke ni povu atendi tiun momenton kun brakoj kunmetitaj sur genuoj? Nepe ne! Nia lingvo, kvankam certe pli perfekta ol multaj lingvoj naciaj, ankoraŭ ĉiam devas evolui. Precipe estas necesegaj fakaj terminoj.

Tial nia unua tasko estas nun, labori tre diligente pri preciza fervoja terminaro. La tasko ne estas tiel facila, kiel eble ŝajnas al multaj kolegoj. Ĉiu termino devas esti zorgeme elektita el internaciaj esprimoj de iu komiso konsistanta el fervojistoj kaj lingvistoj. Alie ni kaŭzus ĥaoson, kiun eĉ la lingva komitato ne kapablos forigi.

Plej frue estas necese prizorgi terminaron por fervojaj komercaferoj, ĉar ĝi estas tre necesa ne sole por la fervojoj mem, sed ankaŭ por la publiko uzanta fervojajn servojn. Kaj tiu terminaro estas plej grava eĉ por la fina venko de nia lingvo mem, ĉar, se ĉi tiu terminaro estos tiel taŭga, ke ĉiu komercisto aŭ vojaĝanto eksperitos, ke en fervojaj aferoj oni povas tre facile interkompreniĝi per esperanto, ili fariĝos niaj helpantoj kaj devigos fine eĉ obstinajn fervojajn administraciojn enkonduki esperanton kiel interkomprenilon. Do, kolegoj, al la laboro! Ĉiu el ni oferu ĉiutage nur duonon da horo al nia komuna afero, precipe al la prilaborado de la fervoja terminaro. La organizon de ĉi tiu laboro prenis sur siajn elprovitajn ŝultrojn nia ŝatata kolego Habellok en Breslau, kiu ĉiun interesulon instruos pri la ĝis nun faritaj laboroj kaj pri la estontaj organizaj planoj.

Nun ĉiu el vi tuj disponigu siajn fortajn al li.

Jos. Řebíček (Olomouc).

Nia laboro.

Pro malsano de nia vicprezidanto s-ro Kašpárek kaj laŭ decido de la komitato de nia asocio, oni metis sur min la pezan sed honoran funkcion de la redaktoro de nia oficiala gazeto. Kiel de unu el la fondintoj de nia asocio en Barcelona, estos certe mia nomo inter la antaŭmilita esperantistaro fervojista nature sub mia tiamano (Jaromír Schwarz, fervoja komisario en Sarajevo, Bosnio-Herzegovino) kelkparte konata. Lando kaj urbo estas nun certe sufiĉe famaj, ĉar tie ekondris la unua mortiga pafo ekbruliginta la tutan mondon.

Nia unua kaj plej ŝatata prezidanto s-ro Berlande mortis antaŭ la eksplodo de la monda milito, li ne vidis la teruran, kun teknika rafineco aranĝitan, homan buĉadon. Al li estis ŝparitaj la doloro, disiluziigo, disreviĝo... Gloron al li kaj ĉiaman memoron ni gardu pri lia persono.

Multaj el niaj kolegoj fervojistoj, inter tiuj ankaŭ esperantistoj perdis dum ĉi tiu kruela milito sian vivon. Gloro al iliaj ombroj, ĉiambenanta memoro restu en niaj koroj pro ilia martireco. — Personoj mortas, sed la ideoj vivas eterne.

Ne estas bezone pritrakti, kiel gravegan, mi povas diri, ĉefan rolon ludis fervojoj dum la monda milito kaj post ĝia fino. Sed same, kiel dum la milito ili servis al celoj detruigaj, tiel estas nun iliaj taskoj kaj devo restarigi en la unua vico la ruinigitan Eŭropon. Ni fervojistoj, precipe esperantistaj, vidas, kiel grava kaj respektinda faktoro ni estis, estas kaj ĉiam devos esti en la vivo de la homaro.

Tial ni inde tenu altan nian standardon profesian. Timigan ekzemplon prezentas al ni en tiu rilato du kompatindaj landoj, Rusio kaj Ukrainio. Tie ekzistas fervojoj, sed mankas aŭ ne ekzistas la fervojistoj; la fervojoj ne funkcias kaj sekvo de tio estas malsato. En la postmilita ĥaoso la fervojistoj savis la situacion en la malpli malfeliĉa parto de Eŭropo.

Nia programo estas simpla, sed tamen pro la ĝenerala obstino de oficialaj rondoj tre malfacila. Tio ne timigas nin. Ju pli peniga laboro, des pli obstinaj estos niaj klopodoj kaj des pli doŭĉa la fina venko. Kun tiu sento ni prezentas al Vi karaj samprofesiaj nian unuan numeron de nia gazeto, kies enhavo esprimas sufiĉe nian programon, almenaŭ parte. Laboru malkaŝe kune kun ni, subtenu nin, ĉar nia gazeto estos la tribuno, la centro de niaj movadoj kaj organiza laboro. Naciaj, klasaj kaj religiaj diskutoj estu afable flanke lasitaj.

Ni petas indulgon kaj paciencon, se ĉio ne estas tiel, kiel oni dezirus kaj atendus. Iom post iom ĉio pliboniĝos en niaj vicoj, sed ni devas seninterrompe fosi nian sulkon.

Estu antaŭ ĉio
bona kamarado
de l'lugila rado!

Nia profesio
esperantigita,
firme starigita
alte sur altaro
de laboro por homaro.
Malgraŭ diverseco
de la nacio —
reciproka amo!
Jen nia programo.

Saluton al vi karaj pacaj kunbatalantoj!

Jaromír Ivanovič.

Voĉo de nia kamaradoj.

La fervojistoj el Mantova, anoj de la I. A. de E. F., salutas kun ĝojo la unuan numeron de la tutmonda faka gazeto: „Fervoja Esperantisto“. Ili estas konvinkitaj, ke ĝia programo, dediĉita al vera fratiĝo de la fervojistoj sen diferenco de nacio, religio aŭ profesia rango, povos rimarkinde plifaciligi la rilatojn inter la popoloj. Dezirante al la tutmonda internacia fervoja faka gazeto la plej grandan disvastigon, ili esperas, ke ĝi faros gravan poresperantan propagandon en ĉiuj landoj. Do samideanoj fervojistoj! Abonu kaj rekomendu al via konatato nian fakan gazeton!

Kurso en Praha.

En Praha aliĝis 28 personoj al esperanto-kurso por komencantoj. Direkto de ĉeĥoslov. ŝtataj fervojoj en Praha kun permeso de la fervoja ministerio donis ĉe la stacidomo „Wilson“ unu lernejan ĉambron al dispono. La kurso estis malfermita la 1. XII. 1921 de ĉefrevidento s-ro A. Kašpárek kaj daŭrigata de adjunkto s-ro V. Benda ĝis la 30. IV. 1922. Kvankam multaj lernantoj ne povis pro fervojaj ekzamenoj regule vizitadi la kurson, estis rezultato kontentiga. Nova kurso komenciĝos aŭtune, kaj oni atendas pli grandan partoprenon. Cetere ĝi dependas de la poresperanta propagando inter fervojistoj. Novajn aliĝojn akceptas s-ro V. Benda, adjunkto ĉe IX/la departemento de la ferv. direkto en Praha.

Hradec Králové.

La klubo esperantista en Hradec Králové (Ĉeĥoslovakio), aranĝis dum la vintra sezono de pasinta jaro specialan kurson de esperanto por fervojistoj. Instruis prezidanto de la klubo s-ro Oto Skleněka, oficisto de „Živnostenská banka“ en Hradec Králové. Al la kurso aliĝis 84 getervojistoj kaj la kurso daŭris de la 1a oktobro ĝis la fino de decembro 1921. La rezultato estis kontentiga. Krom tio aranĝis la klubo apartan kurson por cetera publiko. La fervora sekretario de la klubo estas s-ro Karel Juna, revidento de la direkto de ŝtataj fervojoj en Hradec Králové, departemento VI.

Statistikaj datoj pri ĉeĥoslovakaj fervojoj.

Suma longo de ĉeĥoslovakaj fervojoj estas 13.031 km, el tio 86% estas sub administrado de la ŝtato, 13% sub privata kaj 0,4% sub tiu de fremdaj ŝtatoj. En Bohemio estas 6777 km de fervojoj (1 km je 983 loĝantoj), en Moravio 2218 km (1 km por 1199 loĝantoj), en Silezio 531 km (1 km por 1173 loĝantoj), en Slovakio kaj en Subkarpata Rusio 3504 km (1 km por 1027 loĝantoj). Meznombro por la tuta respubliko oni kalkulas 1 km da fervojo por 1040 loĝantoj. Sub ĉiuj tiuj fervojoj estas 23.332.988 lignaj laŭlarĝaj sojloj, el kiuj 8.270.803 kverkaj, 2.975.473 el ligno de ceteraj foliohavaj arboj kaj 12.086.712 el ligno de arboj koniferaj. Al unu km de fervojo apartenas meznombro 1285 sojloj. Plej granda alto de fervoja limo estas 905 m super mara nivelo, (unuiĝitaj lokaj fervojoj de Sumava), plej malgranda alto estas 97 m en regiono de Bratislava. Plej granda altigado estas 1:14 (loka fervojo de Brno). Pontoj pli longaj ol 2 m estas 8639, viaduktoj 162, tuneloj kaj portikogalerioj 155, kruciĝoj de fervojoj kun la pontoj, kiuj estas super fervoja linio 845, kruciĝoj de fervojaj linioj kun aliaj fervojoj 27.942, interkruciĝoj de fervojaj linioj 236. Suma pezo de ĉiuj metitaj reloj estas 1.452.000 tunoj. La fervojoj administrataj de la ŝtato havas 1673 staciojn kaj 1102 haltejojn, la privataj fervojoj havas 196 staciojn kaj 183 haltejojn.

Sciigo de la administracio.

Abonon sendu sole al la administracio, membran kotizon al kasisto de IAEF s-ro Emanuel Kubásek, fervoja revizoro, Lobezská ul. Prov. domy, skup. B-I-68, Plzeň, Ĉeĥoslovakio. — Kiu jam sendis la abonon al la kasisto, retenu la pagilon por estonta mensendo.

Fervojistoj!

Sendu al la redakcio raportojn pri esperanta movado en via loko, pri agemo de esperantistaj societoj, kluboj, rondetoj kaj pri fervojaj aferoj. Plurigu la enhavon de nia gazeto per via kunlaboro, verkante originale aŭ tradukante artikolojn. Rekomendu ĉe nia konatato nian gazeton, sendu al ni adresojn de tiuj, pri kiuj vi opinias, ke ili abonus, nian gazeton. (Nepagotaj artikoloj estas dankeme akceptataj.)

Redakcio.

Kiel sendi monon al ni?

1. Esperantistoj el Ĉeĥoslovakio, Aŭstrio kaj Polio pagu al ni ekskluzive per pagilo de poŝta ĉekoficejo (platenka poŝtovního úřadu šekového, Erlagschein der Postsparkasse, blankiety nadawcze pocztowej kasy oszczędności). Se vi ĝin ne havas, petu ĝin ĉe ni per poŝtkarto!!! Neniama pagu al ni per poŝtmandato (poštovní poukázka, Postanweisung, przekaz pocztowy), ĉar tia mensendo estas tro multekosta kiel por sendinto tiel por ni!!!

2. Esperantistoj el ceteraj landoj pagu al ni per papermonon en rekomendita letero, sed ekskluzive en valuto montrita por ilia lando en nia tabelo de abonon!

Administracio.

„Nova Eŭropo“.

Post la monda milito aperis sur monda sceno multaj novaj kaj renovigitaj ŝtatoj de liberigitaj malgrandaj nacioj. Tiuj ĉi novaj ŝtatoj estas gravaj, sed malmulte konataj membroj de internacia familio. Por ke la mondo havu okazon konatiĝi al si tiujn ĉi novajn ŝtatojn per informoj prezentitaj de anoj de tiuj nacioj estis fondita esperanta gazeto, kiu sub titolo „Nova Eŭropo“ aperas en Praha (Těšnov 10). La gazeto enhavas grandnombrajn kaj interesajn materialojn

pri malgrandaj nacioj kaj la plej gravajn dokumentojn el la internacia vivo kaj el la esperantista mondo. Nova mondo „nova Eŭropo“ en vera stato malfermiĝas antaŭ okuloj de legantoj. Ni povas rekomendi la abonon de tio ĉi neordinare malmultekosta gazeto (20 Kč por dek numeroj).

Kolegoj, kolektu anoncojn por nia gazeto!

Postula informoj ĉe nia administracio! 132

NOMARO DE LA ANOJ DE J.A.E.F.

- Georg Habellok, inspektoro, Breslau 10, Schleiermacherstr. 19, (Germanio).
- Adolf Kašpárek, ĉefrevidento, Praha-Smíchov, Nádražní ul. 31, (Ĉeĥoslovakio).
- Josef Blažek, inspektoro, Olomouc, Mülherova 266, (Ĉeĥoslovakio).
- Emanuel Kubásek, revizoro, Plzeň, Prov. domy skup. B-I-68, (Ĉeĥoslovakio).
- Hugo Steinhauer, inspektoro, Wien II., Böcklinstrasse 8, (Aŭstrio).
- G. Hedström, fervojisto, Gefle, (Svedio).
- J. W. Poolen, sargestro, Rotterdam, Zwaanshals 2123, (Nederlando).
- W. Kok, ĉefkonduktoro, Rotterdam, Gouvernestraat 2a, (Nederlando).
- Sidonie Dlouhá, kasistino, Praha, Wilsonovo nádraží, (Ĉeĥoslovakio).
- Karl Hell, ĉefinspektoro, Cheb, Grabenstr. 33/II, Ĉeĥoslovakio.
- Joh. Gunia, oficisto, Přívoz 746 (Ĉeĥoslovakio).
- František Fikre, inspektoro, Bratislava, Hdielství st. drah, odd. VII., Ĉeĥoslovakio.
- Otto Geler, oficisto, Dresden, Germanio.
- Karl Göll, ĉefkonduktoro, Podmokly 707, Ĉeĥoslovakio.
- Marta Broistedt, oficistino, Holzminden, Braunschweig, Germanio.
- Antonín Kubásek, vagonarestro, Plzeň, Barrandova 16, Ĉeĥoslovakio.
- Max Schrank, oficisto, Kempten i. Allg., Germanio (Bavario).
- Karl Pfeiffer, inspektoro, Aschaffenburg, Unterfranken, Drentaŭstr. 3/II, Germanio (Bavario).
- Karel Voříšek, ĉefkonduktoro, Plzeň, Litická ul. č. 30, Ĉeĥoslovakio.
- Bohumil Kozák, ĉefkonduktoro, Plzeň, Letná, Jungmannova 93, Ĉeĥoslovakio.
- Leopold Zörner, ĉefrevidento, Plzeň, Sedláčkova 19/II., Ĉeĥoslovakio.
- Antonín Černý, ĉefkonduktoro, Plzeň, Radinská 54, Ĉeĥoslovakio.
- Jindřich Švestka, ĉefkonduktoro, Plzeň, Nepomucká 42/II., Ĉeĥoslovakio.
- Karel Anděl, adjunkto, Olivčín, p. Broumov-Olivčín, Ĉeĥoslovakio.
- Václav Levý, fervojisto, Plzeň, hlavní nádraží, Ĉeĥoslovakio.
- Josef Pech, fervojisto, Plzeň, Houšková 4, Ĉeĥoslovakio.
- Josef Hrabák, fervojisto, Plzeň, Radinská 38, Ĉeĥoslovakio.
- Jan Bodlák, asistento, Vlastec, nádraží, Ĉeĥoslovakio.
- Vojtěch Veselý, revizoro, Plzeň, ředitelství st. drah, VI/3, Ĉeĥoslovakio.
- Otto Charvát, oficisto, Trnava, nádraží, Ĉeĥoslovakio.
- Oldřich Řehák, fervojisto, Kopidlno 57, Ĉeĥoslovakio.
- Václav Kmoch, servisto, Praha VII., Šimáčkova 910, Ĉeĥoslovakio.
- Jan Blabolil, servisto, Praha-Vršovice, Mojmirova 657, Ĉeĥoslovakio.
- Ludvík Herrmann, ĉefinspektoro, Praha-Smíchov, Zbraslavská, Ĉeĥoslovakio.
- D-ro J. Fífk, konsilanto, Praha-Vinohrady, Žižkova 12, Ĉeĥoslovakio.
- František Navrátil, ĉefrevidento, Praha VII., Ovencecká 34, Ĉeĥoslovakio.
- Milan Červený, ĉefrevidento, Benešov 472, Ĉeĥoslovakio.
- Jaroslav Kalda, ĉefinspektoro, Praha-Vinohrady, Háčkova 44, Ĉeĥoslovakio.
- D-ro Zdeněk Domažlický, ĉefkonsilanto, Praha-Smíchov, Dvořákova 1288, Ĉeĥoslovakio.
- D-ro J. Kötting, konsilanto, Praha-Karlín, Královská 22, Ĉeĥoslovakio.

41. František Stejskal, konduktoro, Praha-Vinohrady, Mikovcova 9, Ĉeĥoslovakio.
42. D-ro Antonín Žipek, koncipisto, Praha-Smíchov, Třebitzského 1215, Ĉeĥoslovakio.
43. Václav Juhn, konsilanto, Praha-Vinohrady, Vozová 6, Ĉeĥoslovakio.
44. Filip Kopřiva, oficialo, Praha-Nusle, Riegrova nám. 5, Ĉeĥoslovakio.
45. Josef Staňa, konduktoro, Praha VII., Jabloniského 639, Ĉeĥoslovakio.
46. Rudolf Volek, konduktoro, Praha I., Anežská 6, Ĉeĥoslovakio.
47. Zdeňka Dufková, skribistino, Praha-Vršovice, nádraží, osobní pokladna, Ĉeĥoslovakio.
48. František Macík, ekspediento, Čerčany 43, Ĉeĥoslovakio.
49. Karel Urbanec, ĉefrevidento, Praha-Karlín, Riegrova 8, Ĉeĥoslovakio.
50. D-ro Karel Nechvíle, ĉefkonsilanto, Praha-Vinohrady, Budečská 47, Ĉeĥoslovakio.
51. Bohuslav Hejnic, revizoro, Praha VII., Vltavská 161, Ĉeĥoslovakio.
52. Karel Frank, ĉefrevidento, Praha, Wilsonovo nádraží, Ĉeĥoslovakio.
53. Karel Leš, fervojisto, Senica, nádraží, Ĉeĥoslovakio (Slovakio).
54. Antonín Máša, vagonareksp., Bolehošť 85, Ĉeĥoslovakio.
55. Eduard Sturm, staciestro, Horní Jiřetín v sev. Čechách, Ĉeĥoslovakio.
56. Josef Koubek, oficialo, Borohrádek, Ĉeĥoslovakio.
57. Josef Doubek, konduktoro, Praha-Vinohrady, Komenského 31, Ĉeĥoslovakio.
58. Václav Třešňák, konduktoro, Praha-Vinohrady, Palackého 82, Ĉeĥoslovakio.
59. Jaroslav Kudlík, fervojisto, Praha-Žižkov, Poděbradova 4, Ĉeĥoslovakio.
60. Vojtěch Vodrážka, fervojisto, Praha VII., U Vozovky 245, Ĉeĥoslovakio.
61. Jan Dušek, konduktoro, Praha VII., Palackého 81, Ĉeĥoslovakio.
62. Alois Domáček, konduktoro, Praha-Vinohrady, Brandlova 43, Ĉeĥoslovakio.
63. Alois Daněk, konduktoro, Praha-Žižkov, Svihovského, Ĉeĥoslovakio.
64. Frant. Lambert, konduktoro, Praha XV., Všebrdova 3, Ĉeĥoslovakio.
65. Karel Juna, revidento, Hradec Králové, 574, Střelecká, Ĉeĥoslovakio.

(Daŭrigo en la venonta numero.)

SOMERA RESTADO

En ĉi tiu rubriko ni publikigas la nomojn de la personoj, kiuj volas ŝanĝi liberecon per ĉi tiuj ĉi lita familio.

PREZOJ: Unu linio kosta 3 Kč. Vi povas sendi letere banknotojn. Por dek sinsekva publikigoj 20% rabato. Dike presitan linion oni kalkulas kiel du liniojn.

Restadon apud maro dum julio kaj aŭgusto serĉas per rekompenco s-ro Adolf Kašpárek, ĉefrevidento en Praha-Smíchov, Nádražní 31.

Restadon en Francio (apud maro) dum aŭgusto serĉas rekompence s-ro Jaromír Ivanovič-Schwarz, Praha II., Pod Slovany 11. Ĉeĥoslovakio. 102

ANONCETOJ

PREZOJ: Unu linio kosta 3 Kč. Vi povas sendi letere banknotojn. Por dek sinsekva publikigoj 20% rabato. Dike presitan linion oni kalkulas kiel du liniojn.

Japana esperantisto komprenanta ĉeĥan kaj polan lingvon serĉas iun korespondanton en Ĉeĥoslovakio kaj Polio. Skribu esperante, ĉeĥe kaj pole. Ĉiam certe respondos. D-ro Aitaro Jamanoj, Minamodawara, st. III. Kiohashi, Tokio, Japanio. 92

Fotografadoj de partoprenintoj en la II. labor-kunveno en Kladno (I. V. 1922) estas haveblaj ĉe Esperantista klubo „Zamenhof“ en Kladno: 1 peco Kč 3 — aŭfrankite.

Pastro L. W. Cronkrite foriros fine el Burma fruapril, kaj alvenos Usonon ĉirkaŭ unna de junio. Nova adreso de nun, Greenview, N. Y., U. S. A. Li plezure aŭdos de ĉiuj gekorespondantoj. 87

Filatelistoj! Kiuj sendos al ni 50 poŝtmarkojn de sia lando, ricevos la saman kvanton da ĉeĥoslovakaj poŝtmarkoj. B. Stárka, Praha-Vinohrady, Orégrova 18. 127

S-ro Vitold Tenisov, Barnaul, Siberio, informas stajn geamikojn, ke li precize respondis al ĉiuj korespondantoj, kiuj li dum 1921. ricevis kaj li ne estas kulpata pro la malordita reganta en poŝtaj rilatoj nuntempe. 125

KORESPONDADO

PREZOJ: Unu enskriba dufinta kosta 4 — Kč. Vi povas sendi letere banknotojn. Por dek sinsekva publikigoj 20% rabato.

MALLONGIGOJ: PK — poŝtkarto, PL — literitaj poŝtkarto, L — letero, PM — poŝtmarko, BFL — poŝtmarko sur blidankilo. KCL — kun ĉiuj landoj. EA — esperantisto, EG — esperantista gazeto, ĈU — korespondanto (anoncanto) havas moralan devon aldoni unufoje respondi.

AŬSTRIO.

Wien. XIV. — S-ro Karl Kochmann, filo de gastejestro, Hugigasse 15, PM, kaj aŭstrian militpaperonon KCL, certe tuj respondas.

BELGIO.

Lez Gand. — F-ino Marie Roeland, Rue de l'avenir 20, Mnt Su, Amand, PL, PM.

St. Niklaas W. — S-ro G. de Boes, Zamanstraat 14, PL, PK, PM, L, ĉiam respondos.

BULGARIO.

Reli Osm — S-ro Koljo Benev, Trojan, PL, L, KCL.

Karlovo. — S-ro M. Ruskov, PK, PL, PM, L, interlingas ĉion kaj konfertas silkon (sejono, semojn, vivulojn, papiliojn kaj materialojn).

ĈEĤOSLOVAKIO.

Josefov-nádraží. — S-ro Josef Mertlík, PL, PM.

Kopidlno. — S-ro Oldřich Reháč, PM, PL, L, esp. propagandistoj, KCL.

Nové Město n. Metují. — F-ino Vlasta Dvořáková, skoltino, No 24, korespondas esperante, ruse kaj germane.

Praha II. — S-ro František Čoupek, vavianské n. 21, PM, PL.

Praha-Břevnov. — Fraňko Jan Reháč, Tomkova 433, PL, PM, KCL, BFL, L.

Praha-Vinohrady. — S-ro Bedřich Stárka, bankoficisto, Gregrova 18, PM.

Praha-Vinohrady. — S-ro Jaroslav Vachalovský, Na Světhane No 4, PM kun samideanoj el Japanio, Ĉinio, Rusio, Hindio, Ameriko, Aŭstralio, Afriko, Tasmanio, Nova Zelandio ktp.

Úpice. — F-ino Mária Bourová, instruistino-ucitelka, PL.

ESTONIO.

Tallinn. — F-ino A. Ivanov, S. Pärnu m. 38, PL, BFL.

Tallinn. — S-ro R. Reim, S. Pärnu m. 102, PL kun ĉiuj landoj.

FRANCIO.

Chartres (Eure-et-Loir). — S-ro J. Souzay, presarkorektisto, 13 rue du Petit-Beauvais, PL, PM, BFL, KCL.

GERMANIO.

Eisleben. — S-ro Wilh. Lange, Hallesche Str. 68, PL, KCL, PM.

Hobendorf b. Hainichen i. Sa. — S-ro Eric Gehre, PM kun ĉiuj landoj.

HISPANIO.

Nerva-Huelva. — S-ro Juan Vázquez, strato Jaime Vera No. 24, deziras ekligi rilatojn kun komercistoj dezirantaj eksporti komercaĵojn en Hispanio.

ITALIO.

Firenze. — S-ro capit. Michele Liverani, Via S. Gallo 27, PL, BFL, PM. Ĉiam respondas.

JAPANIO.

Kioto. — S-ro Teichi Fujibayashi, Tanaka Sekiden-cho 33, deziras korespondadi per PL kun samideanoj en la tuta mondo.

Kioto. — S-ino Tamako Terao, Kazan Genkeji, Jamashina, PL, KCL.

Kuini-Tsutsui, Kobe. — S-ro Ichiro Aoki, 777 Chome, PL, PM

Osaka. — S-ro Tadaši Aizawa, Takashinohama 779 Tunao dez koresp. precipe kun fraŭlinoj PL, L.

JUGOSLAVIO.

Ljubljana. — S-ro A. Volný, Bleiweisova S. III., PL, PM, KCL.

POLIO.

Częstochowa. — S-ro Fr. Bartoszek, Częstochowianka, PM, PL, L, BFL.

Łódź. — S-ro J. Gličenštajn, Zachodnia 54, PL, L, BFL kun samideanoj el la tuta mondo. Tuj respondas.

Raków-Częstochowa. — S-ro Józ. T. Strykowski interlingas polajn PM, bazo Michel 1920 aŭ Yvert-Tellier.

RUMANIO.

Sibiu (Transilvanio). — S-ro Tomaso Oărtner, Roszmangati 4, deziras korespondadi kun samideanoj KCL prefere per PL.

RUSIO.

Orel. — S-ro Vs. Basov, direktoro de Eksperimenta Psikologia Laboratorio, 2a Puskarskaja No 19, serĉas seriozajn korespondantojn pri psikologio kaj pedagogio eksperimentaj, psikotekniko, difektologio; ankaŭ por muzeo Turgenev li interlingas tradukadojn de liaj verkoj.

Tambov. — S-ro Anatol Volochov, Kambarovskaja 48, L pri vivkulturo, sporto kaj diversaj demandoj de vivo.

Vladivostok (Siberio). — S-ro Vladimir N. Kosytsin deziras interlingas papieran monon KCL.

UKRAINIO.

Bachmut. — S-ro Lazaro Abramovič, Ĉarkovskaja 65, L, PL, BFL, kun ĉiuj landoj. Ĉiam tuj respondas.

Bachmut. — S-ro Aleksandro Trachterov, Ĉarkovskaja 32, L, PL, BFL.

Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj (I. A. E. F.)

estis starigita dum la XIII. Universala Kongreso de Esperanto en Praha (2./VIII. 1921) Ĝia celo estas: Propagando kaj instruado de Esperanto; eldono de faka vortaro (terminaro) kaj de universala fakgazeto; fine, klopodo plifaciligi al la geasocianoj kaj iliaj familianoj la vojaĝadon kaj restadon en fremdlandoj.

En la komitato de I. A. E. F. estis elektitaj la sinjoroj:

1. Prezidanto — Georg Habello, fervoja inspektoro, Breslau 10 (Germ.) Schleiermacherstrasse 19.

2. Vicprez. — Adolf Kašpárek, fervoja ĉefrevidento, Smíchov — Nádražní ul. 31 — Ĉeĥoslovakio (rezignis pro malsaneto).

3. Sekretario — Josef Blažek, fervoja inspektoro, Olomouc — Müllerova tř. 266 — Ĉeĥoslovakio.

4. Kasisto — Emanuel Kubásek, fervoja revizoro, Plzeň — Lobežská ul. Prov. domy Skup. B.-I.-68. — Ĉeĥoslovakio.

La jarkotizo: 5 Kč, 10 mk (germ., eston., leton., litov.) 10 mk finaj, 2 fr (fr. blg.) 1 šiling, 2 k skand. (sved. crorv.) danaj, 2 liro, 2 drakmoj, 10 dinaroj, 3 pesetoj, 20 levoj, 10 lejoj, 250 kr (aŭst.), 100 hung., 100 mk polaj, 1 guld. hol., 1/2 dolaro (ank. Buenos Aires), 2 jenoj jap., ceteraj landoj 1 fr svisaj.

La enskriba pago: 3 Kč, 5 mk germ., 5 mk fin., 1 fr., 1/2 šil., k. t. p. ĉiam la duonon de la jarkotizo. (Estas necese reguligi pli precize suprajn prezojn en la ferv. konferenco dum la XIVa en Helsinko.)

La jarabono montrita en la tabelo de abonoj.

Aliĝilo.

Mi aliĝas al la I. A. E. F. Mi mendas ekzempleron de „Fervoja Esperantisto“.

Jarkotizon kun la enskriba pago } notu la sumon en Via

Jarabonon de la gazeto } monunuo (valuto)

mi sendas (kasisto S-ro Em. Lubásek en Plzeň } en rekomendita letero (pro

al la (Peranto Delegito*) S-ro en } ĝisnunaj poŝtaj malfacilaĵoj)

1. Familia nomo (S-ro, S-ino, F-ino) 1

2. Antaŭnomo 2

3. Profesio 3

4. Oficiala loko 4

5. Gepatra lingvo 5

6. Nacieco 6

7. Strato kaj numero 7

8. Urbo 8

9. Provinco 9

10. Lando (ŝtato) 10

Resendu vian aliĝilon senprokraste nur al la sekretario! Oni sendu la jarkotizon kun ensk. pago al la kasisto! La membrokarto (legitimacio) estos poste tuj forsendita al via adreso.

Aldonu por respondo ĉiam respondokuponon aŭ aŭfrankon en neuzitaj naciaj poŝtmarkoj!

La Komitato de I. A. E. F.

* Se ekzistas iu elektita enlanda (peranto) delegito, li afable forsendos de tempo al tempo la kolektitan monsumon kun nomarlito al nia kasisto s-ro E. Kubásek, kaj la aliĝilojn al nia sekretario s-ro J. Blažek.


Ekzemplo: En Nederlando ekzistas (laŭ sciigo dum la XIIIa U. K. de E. en Praha) la delegito s-ro J. W. Poolen (sekretario de ferv. klubo) Rotterdam, Zwaanshals Nr. 212b.

S-roj delegitoj estos antaŭzorgemaj kaj deskribos antaŭ forsendo la persondofaron, ĉar povos okazi, ke la letero kun la aliĝiloj dumvoje povus perdiĝi.

La asocia sekretario restos danksulda al tiuj societoj aŭ unuopaj samideanoj fervojistoj, kiuj sin tuj anoncis kiel perantaj Delegitoj kaj subtenos tiamaniere nian nuntempe malfacilan organizan laboron!

Skribu tre legeble aŭ per skribmaŝino!

La plej delikata
CIGAREDA PAPER



Waldes Antob

CIGAREDAJ TUBETOJ

Postulu senpagan ilustr. broŝuron pri
via partopreno je profito ĉe firmo
WALDES & KIO, Praha-Vršovice, Ĉeĥoslovakio.

NI REKOMENDAS SUKERAĴEJON
KAFEJON
AMERIKAN-BAR
de
KAREL JULIŠ PRAHA,
Václavské náměstí 22.
Ciutage koncerto!

INTERNACIA
FOIRO EN PRAHA
ĈEĤOSLOVAKIO

V^a FOIRO: 3.-10. sept. 1922

Bonvolu adresi informetojn al la kon-
sulejoj de la Ĉeĥoslovaka Respubliko, la
oficialaj reprezentantoj de la foiro kaj la

FOIRA OFICEJO
Praha I., Staroměstská radnice.
Telefonnumeroj: 7434 kaj 9140.
Kabloadreso: Foiroficejo Praha.

Ukraina Stelo.

Organo de ukrainaj esperantistoj.

— Monata —

Plej bona informilo pri popola vivo, kutimoj,
moroj, suferoj kaj krea spirita forto de ukraina
nacio.

Jara abono por enlando 1000 polajn markoj,
por eksterlando 3000 polajn markojn.

Administracio: Eldonejo „Bystrycja“, Sta-
nyslaviv, str. Goluchowski 54, Orienta Galicio,
Polujo.

MEBLOJ,

doto por fianĉinoj, kompleta arango de loĝejoj
J. KURZ & SYN, Praha, Pofič 18.

! ABONU LA REVUON !

» VERDA UTOPIO «

MONATA REVUO ILUSTRATA PRI JAPANAJ
LITERATURO, ARTO, MORO, SOCIA VIVO K.T.P.

Jara abono: malaltigitaj jeno: eksterlando Y 170, enlando Y 150
Speciala jara abono por Ĉeĥoslovakio: Kč 30.—.

Redakcio kaj administracio:
6265, Uehomaci 7-ome, Minamiku, Osaka,
Japanio.

ABONEBLA ĉe la administracio de „Nova
Eŭropo“ Praha II., Těšnov N° 10.

Kiu volas trinki bonan teon, postulu ĉiam sole:

„TEA NIKOLAU“

Kie ne estas ricevebla, skribu rekte al:

Tea Nikolau, Praha VII., Jiráčkova 5.

113 Ĉe realvoko al tiu ĉi anonco 6% rabato.

„L'ESPERANTO“

Monata ilustrita internacia revuo sub patronado de Itala
Katedro de Esperanto. — Abono: 15 liroj (8 francaj fr.)
(per postmandato, cekoj, respondkuponoj, aŭ en kiu ajn nacia
mondo, en rekomendita letero).

Direkcio: S. Vito al Tagliamento (Italujo).

Konstantaj rubrikoj de la Revuo ĉiuj en E.J.: Ĉefa
artikolo. Gramatikaj de Frula (lingvo, Esperanta Sionimaro).
Kiel oni farigas gramatikojn? Rimoj kaj Versoj. Noveloj kaj
Rakontoj. Itala Animo, diligentaj tradukoj de verkoj de
klasikaj italaj aŭtoroj. Revuo de la Revuoj, interesplena rubriko,
kiu per klaraj resumoj kolektas la plej notindajn sciindaĵojn
aperintajn en la ĉefaj E. gazetoj de la mondo pri la plej diversaj
temoj. De Alpoj al la maro, priskriboj de la urboj kaj de
l'interdaŭoj de Italujo. Esperantaj sciigoj. Recenzoj, koresp.,
humoraj kaj ktp.

FABRIKO

DE KALKULILOJ,
DATOPRESANTAJ
KAJ
KUNKUDRANTAJ
MAŝINOJ.

MODERNAJ

STAMPILOJ
B. ZAHRADNIK
PRAHA II.,
VODIČKOVA No 13.
ĈEĤOSLOVAKIO.

112

Via horloĝo

funkcias precize

se vi ĝin donos por ripari al
Frant. Novák, horloĝisto
en Praha I., Malé nám. 10.

Horloĝoj. - Juveloj.
- Malaltaj prezoj. -



Esperanto-gimarkoj, 100 pecoj Kč 4.—, afrankite Kč 5.—,
12 diversaj specoj: 1000 pecoj Kč 35.—, afrankite Kč 37.50.
Esperanto-insignoj, oficialaj insignoj de „C. A. E.“ malgranda
pinglo Kč 3.—, afr. Kč 4.20, 10 pecoj Kč 25.—, afr. Kč 27.60.
Pli granda, pinglo, broĉo aŭ por butontruo: Kč 4.—,
afrankite Kč 5.20, 10 pecoj Kč 35.—, afrankite Kč 37.50. 45

Legu, abonu kaj rekomendu
la plej bonan informilon pri novaj ŝtatoj
de Eŭropo monatan gazeton

„NOVA EŬROPO“
esperanta tribuno de malgrandaj nacioj.

Abono por 10 numeroj:

Anglio 2 ŝilingoj, Aŭstrio 400 kronoj, Belgio 4 frankoj, Bul-
gario 20 levoj, Ĉeĥoslovakio 10 Kč, Danio 2 kronoj, Finnlando
29 markoj, Francio 4 frankoj, Germanio, Estonio, Latvio kaj
Litovio 30 germanaj markoj, Hispanio 3 pesetoj, Hungario
75 kronoj, Italio 8 liroj, Japanio 2 jenoj, Jugoslavio 20 dinaroj,
Nederlando 1 guldeno, Norvegio 2 kronoj, Polla 200 niarkoj,
Rumanio 20 levoj, Rusio 100.000 rubloj, Svisio 2 frankoj, Usono
50 cendoj kaj por ceteraj landoj 2 svisaj frankoj.

Bonaĵo por fremdlando: al ĉiuj 3 pagitaj ekzempleroj
sendataj al unu adreso ricevos la abonanto unu ekzempleron
senpage. — Ni konsilas abonpagaĵi por 20 numeroj.

Specimena numero senpage!

Administracio kaj redakcio:
Praha II., Těšnov N° 10, Ĉeĥoslovakio.

Niaj abonejoj en

Belgio: s-ro Camiel Verstrepen, Wibrijeksel: vest 76,
Antwerpen.
Estonio: s-ro R. Lorentson, Vesivärava t., 18a, k. 12,
Tallinn. — S-ro H. Janverk, Vazalemo.
Japanio: Administracio de „Verda Utopio“, 5265 Uehom-
mači 7-ome, Minamiku, Osaka.
Usono: Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Ave-
nue, New York City.

Legu, abonu kaj rekomendu

la unusolan internacian monatan fakan gazeton

FERVOJA ESPERANTISTO

organo de
Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj.

Abono por 10 numeroj:

Anglio 2 ŝilingoj, Aŭstrio 400 kronoj, Belgio 4 frankoj, Bul-
gario 20 levoj, Ĉeĥoslovakio 10 Kč, Danio 2 kronoj, Finn-
lando 20 markoj, Francio 4 frankoj, Germanio, Estonio,
Latvio kaj Litovio 30 germanaj markoj, Hispanio 3 pesetoj,
Hungario 75 kronoj, Italio 8 liroj, Japanio 2 jenoj, Jugoslavio 20 dinaroj,
Nederlando 1 guldeno, Norvegio 2 kronoj, Polla 200 niarkoj,
Rumanio 20 levoj, Rusio 100.000 rubloj, Svisio 2 frankoj, Usono 50 cendoj
kaj por ceteraj landoj 2 svisaj frankoj.

Bonaĵo por fremdlando: al ĉiuj 3 pagitaj ekzempleroj
sendataj al unu adreso ricevos la abonanto unu ekzempleron
senpage. — Ni konsilas abonpagaĵi 20 numeroj.

Specimena numero senpage!

Administracio kaj redakcio:
Praha II., Těšnov N° 10, Ĉeĥoslovakio.

Samideanoj el Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio kaj Polla postulu pa-
gilon de poŝta ŝparkaso ĉe nia administracio.

BANKA ČESKOSLOVENSKÝCH LEGIÍ

Adreso de telegramoj: „Legiobanka.“ (BANKO DE ĈEĤOSLOVAKAJ LEGIOJ)
PRAHA II.

Akcia kapitalo Kč 70,000.000.

Telefonaj numeroj

6580, 79 93, 7105, 7106, 7107

Rezervaj fondoj Kč 18,000,000.

Filioj en Bratislava, Brno kaj Plzeň. Ekspozituroj en
Kolín, Píšťany, Duchcov kaj Nové Město n. Váhem.

Plenumas ĉiujn bankajn kaj industriajn transakciojn. — Kompensoj por fremdlandaro.
Akceptas mondeponojn je libroj kaj kurantaj konto.